



Estrara Komunikilo: EKO 2016-38 sendita el Bunda, Tanzanio, la 25an de decembro.

Ĵus okazis la interkona vespero de la 6a Afrika Kongreso de Esperanto, en la vespero vaste celebrata kiel la kristnaska vespero. La spirito de tiu vespero – paco kaj bonvolo inter plej diversaj homoj, forte esprimiĝis en tiu kongreseka festado. Post salutoj, ĉiu prezentis sin kaj fine ĝueblis kantoprezentoj el plej diversaj landoj kaj kulturoj. Kulminoj estis elstara kantistino el Brazilo, kaj la entuziasma prezento de du orientafrikaj melodioj liveritaj de la tanzaniaj kaj kenjaj samideanoj.

La 29a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) ekis en la kristnaska tago. Gvidis la malfermon s-ro Adjevi Adje, la gvidanto de la Afrika komisiono. Koncizan skizon pri la celoj kaj historio de la AMO-programo prezentis Stefan MacGill, la vic-prezidanto de UEA kaj iusence la 'patro de AMO'. Adjevi fermis la malfermon per prezentado de la gvidontoj de la seminario.

Jam okazis la unua seminaria sesio, kiu temis ĉefe pri la esenca rolo de verboj en Esperanto, kaj la graveco elstarigi ilin en lern-programoj. Verboj en Esperanto samtempe unike facilas kaj malfacilas. Frue la seminarianoj havis eblon en etaj grupoj diskuti kaj reraporti pri la facilaj kaj malfacilaj partoj de Esperanto. Ĉiuj grupoj iumaniere menciis la uzon de la akuzativo – la seminaranoj aŭdis, ke akuzativa uzo ne estas substantiva demando, ja ne dependas je vortordo, sed je la karaktero de la verbo. Gravas prezenti verbojn en sia minimuma kunteksto, por ke lernantoj sciu klare, kiel uzi ilin.



La nivelo kaj entuziasmo de intervenoj estis bonvenaj. La seminario altiris 39 partoprenintojn, rimarkinde, konsiderante, ke ankoraŭ ne alvenis la 11-persona karavano el Koreio, nek pluraj aliaj (ĉu laŭplane, ĉu pro vojaĝobstakloj). La partoprenintoj venis el almenaŭ ok landoj: eksterafrike: Francio, Islando, Hungario kaj Japanio, enafrike: Burundo, Kongo DR, Kenjo, Tanzanio kaj Zambio.

La sesio venis al fino per prezento lumbilda pri la Jaro de la Lernanto – komuna projekto de UEA kaj ILEI. Sekvos en la posta tago etgrupa diskuto pri la temaro de tiu Jaro, kun daŭrgio pri la verba temaro.



La formala malfermo de la 6a AKE okazos nur marde, kiam disponeblas la urbesrto de Bunda kaj aliaj gastoj, kaj ĝis kiam espereble la plena kongresanaro estos alveninta. Ja notindas 102 aliĝintoj el bona gamo da landoj en kaj ekster Afriko – sendube rekorda Afrika Kongreso.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...